

# Quicumque Christum quæritis

## Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 6-an de januaro > Epifanio de la Sinjoro > vespera laŭdo (1)  
Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 6-an de januaro > Epifanio de la Sinjoro > matena laŭdo  
Kristnaska tempo > ekde Epifanio > matena laŭdo

<i>Quicumque Christum quæritis, oculos in altum tollite: illic licebit visere signum perennis gloriæ.</i>	Serĉante Kriston levu do l' okulojn supren al ĉiel', ĉar tie povos vidi vi la signon de l' eterna glor'.
<i>Hæc stella, quæ solis rotam vincit decore ac lumine, venisse terris nuntiat cum carne terrestri Deum.</i>	Ĉi stel', pli hela ol la sun', pli bela laŭ dekor' kaj bril', anoncas, ke en homa karn' alvenis Dio sur la ter'.
<i>En, Persici ex orbis sinu, sol unde sumit ianuam, cernunt periti interpretes regale vexillum magi.</i>	Jen magoj el la sin' de l' mond', de l' orienta suno-pord', fakule interpretas ĝin simbol' de naskiĝinta reĝ'.
<i>Quis iste tantus – inquit – regnator astris imperans, quem sic tremunt cælestia, cui lux et æthra inserviunt?</i>	Demandas ili: Kia Li, movanta astrojn sur ĉiel', potenca super lum' kaj bril', ke steloj tremas antaŭ Li?
<i>Illustre quiddam cernimus quod nesciat finem pati, sublime, celsum, interminum, antiquius cælo et chao.</i>	Jen ion faman vidas ni, majestan, en sublima glor', pli oldan ol la firmament' kaj ol ĥaos', sen ajna lim'.
<i>Hic ille rex est gentium populique rex Iudaici, promissus Abrahæ patri eiusque in ævum semini.</i>	De ĉiuj gentoj Li la Reĝ', kaj de l' popolo Izrael', laŭ Dia vort' al Abraham' kaj liaj idoj tra l' eon'.
<i>Iesu, tibi sit gloria, qui te revelas gentibus, cum Patre et almo Spiritu, in sempiterna sæcula.</i>	Al Vi, Jesuo, estu glor', Vi montras Vin al ĉiu gent'. La Patro kaj la Di-Spirit' gloratu same en etern'.
<i>Amen.</i>	Amen.